

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 fkoj
Subtena : 5 fkoj
Bonfara : 10 fkoj

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagô 4)

JANUARO - FEBRUARO

1961 1

KULTURAJ KAJEROJ

1961 Januaro - Februaro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represajo.

ENHAVO

Pri la Esperantista Kulturdomo.

Esperanto tra la mondo.

TURISMO :

Saumur, la Perlo de Anjou (S-ino B. Chevery).

EL IE EN LA MONDO :

Notoj pri mondvojaĝo (J. Guillaume).

Kibuco, kooperativa vilaĝo en Israelo (II) (Ota Ginz).

Kiel Vivis la Indianoj — P. B.

La Lingva Angulo : Israelo - Izraelo (D. Dalmau).

Tra la Esperanta Literaturo : Nylen Paul, Axel (S. Guillot).

Al Nova Jaro (A. Tolokoncev).

Por via Distro : Nia konkurso.

La Junaj Detektivoj (Fino) — J.H. Sullivan.

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

EL LA REDAKCIO

PRI LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

« Kulturaj Kajeroj » malgrau ankoraŭ mallonga vivo pli kaj pli disvastiĝas en la tuta mondo. Ĝi nun transiras montojn kaj oceanojn ĝis la plej malproksimaj landoj. El ĉiuj tiuj landoj venas leteroj amikaj, kuraĝigaj. Ili montras, ke la vojo sekvata estas bona, kaj ankoraŭ plifortigas la deziron de la redaktoroj plezurigi ĉiujn legantojn. Sed, kvankam plenumindaj, ne ĉiuj deziroj estas plenumeblaj. Multaj estas la malfacilaĵoj. Sed helpe de vi ni certe venkos ilin unu post la alia. Kiel helpi ? Amase abonigu viajn amikojn samkaj alilandajn. Ne forgesu, ke simpla abonprezo repagas nur parton de niaj elspezoj. Granda helpo estas subtena aŭ bonfara abono.

Sed tiu alvoko ne estas la vera celo de tiuĉi artikolo. Tiu celo estas respondo al la ofta demando de niaj alilandaj amikoj : « Parolu al ni pri la Esperantista Kulturdomo ! »

La nomo Kastelo Gresillon, jam famiĝis en la tuta esperantista mondo. Sed ne multaj esperantistoj konas ĝian historion, ĝiajn celojn.

Post la lasta milito pruviĝis pli kaj pli malfacile organizi la somerajn renkontiĝojn, kiuj ĉiujare okazis en unu aŭ alia urbo de Francujo. Pro tio S-ro Micard nelacigebla tiama ĝenerala sekretario de la Grupo de la Esperantistaj Edukistoj havis ideon starigi sendependan kooperativan asocion por aĉeti domegon, kiu fariĝus kunvenejo de la Esperantistoj. Post pluraj esperoj kaj malesperoj, kun granda kuraĝo kaj persistemo, S-ro Micard sukcesis en 1952 starigi la asocion, kolekti la monon kaj trovi domegon, Kastelo Gresillon, aŭ pli precize la 17 hektaran bienon Gresillon.

La celo estis ne nur disponigi al la esperantistoj kunvenejon sed starigi kulturan centron. La administrantaron de la esperantista kulturdomo konscias, ke Esperanto ne estas cela sed rimedo. Pro tio oni ne nur lernas esperanton en Gresillon, sed oni ankaŭ utiligas ĝin. La celo estas duobla.

Multaj kursoj diversgradaj okazas dum la paskaj ferioj kaj de la mezo de Junio ĝis la mezo de Septembro ĉiujare multaj personoj, ĉefe gejunuloj esperantiĝas en Gresillon. Aliaj perfektiĝas aŭ eĉ pli detale studas la gramatikon kaj la literaturon. En 1961 la Kulturdomo inaŭguras novan specialan studperiodon celantan preparadon al Esperanto-instruado. La biblioteko de Gresillon disponigas al la restadantoj multajn ofte tute netroveblajn librojn. Plie la Kulturdomo eldonis tri diversgradajn perkorespondajn kursojn.

Pri la utiligo de la lingvo kompreneble la ĉeesto de diverslandaj gesamideanoj estas bona afero. Dum la dua parto de Julio ĉiujare okazas Internacia Renkontiĝo okaze de kiu elstaraj esperantistoj prelegas pri esperantaj aŭ pli ĝeneralaj temoj. Tiu periodo ĉiam bonege sukcesas. Plie la Kulturdomo akiris filmojn franclingvajn kiuj estis esperantigitaj. Ili estas prezentitaj plurfoje dum la jaro okaze de distraj vesperoj. Serioj de diapozitivoj havas sian esperantlingvan komenton kaj kelkaj prelegoj estis registritaj sur sonbendoj. Dum specialaj periodoj oni ankaŭ instruas bindarton kaj plektarton. Ĉis nun nur francoj sekvis tiujn artajn kursojn sed se alilandanoj interesiĝos pri tiuj artoj ili estos bonvenaj kaj kompreneble la klarigoj estos esperantlingvaj. Fine tre precizaj programoj de ekskursoj estis planitaj por la grupoj aŭ turismaj organizoj, kiuj deziras viziti dum pluraj tagoj, nian ege vizitindan regionon, kiu etendiĝas de la famaj Loirekasteloj ĝis la Atlantika kaj la Ĉanela marbordoj.

Jen finita la mallonga prezentado de la Kultura vivo en nia Domo. Kompreneble ni scias ke multaj plibonigoj devus esti aldonitaj. Tio dependas de ĉiuj. Ju pli nombraj la vizitantoj des pli facile solveblaj la problemoj kaj glate ireblaj la vojoj al la fina celo. Do, vizitu nian Kastelon multnombre !

REĜUSTIGO :

En nia lasta numero, en la artikolo de S-ro Belhoste titolita « Nepre ni konservu la simplecon de Esperanto », eraro sin ŝovis en la teksto : linio « elsaltis ». En la unua kolumno anstataŭ : **« Laŭ la Zamenhofaj konsiloj, kiam oni iras « descendas »**, bonvolu legi : **« Laŭ la Zamenhofaj konsiloj, kiam oni iras malsupren al io oni malsupreniras ; nun oni « descendas ».**

La verkinto kaj la legantoj bonvolu nin senkulpigi.

Esperanto tra la Mondo

PRI LA UNIVERSALA KONGRESO EN HARROGATE. — Oni anoncas artan amatoran konkurson kaj konkurson pri propagandaj afiŝoj.

Cseh-seminario okazos dum la kongresa semajno, dum 15 horoj (enskribiĝoj sendotaj al Internacia Esperanto-Instituto Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando).

Pluraj interesaj ekskursoj estas jam anoncitaj.

Korespondadreso de la oficejo : 46-a Universala Kongreso de Esperanto, Harrogate.

La naciaj esperanto-asocioj povas pruntericevi interesan sonbendon pri la Kongreso.

La oficiala postkongreso estos traveturo tra Skotlando de la 12-a ĝis la 19-a de Aŭgusto.

ESPERANTO KAJ RADIO. — La junulfako de AVRO Hilversum preparas dissendojn de internaciaj kontaktoj inter infanoj, pere de Esperanto, kun interŝanĝoj de sonbendoj kaj de malgrandaj tipaj ludiloj inter infangrupoj. Skribu al Sro A.M.D. Korff, Hengelolaan 1027, Den Haag, Nederlando.

EN AZIO. — En Beirut, ĉefurbo de Libano, fondiĝis Libana Esperanto-Asocio kaj komenciĝis kurso ĉe la Amerika Universitato. La prezidanto petas sendon de propaganda materialo : Sro Adib Saad, Faculty of Agricultural Sciences, American University of Beirut, Libano.

En Hindujo, Sino Haudebine malfermis novan kurson en New Delhi.

En Nord-Vjetnamo aperis ampleksa Esperanta-Vjetnama Vortaro.

Ekstraktoj de verkoj de Lenin aperis en esperantlingva volumo en Ĉinio.

EN AFRIKO. — En Maroko Sro Tibor Sekelj faris paroladon inter studentoj de Rabat. Kursoj malfermiĝis kun helpo de britino, en tiu urbo kaj en Kenitra.

Sekve de ekspozicioj, kursoj komenciĝis en Mozambiko.

POR LA GEJUNULOJ. — Germana Esperanto-Junularo organizas inter la 30-3 kaj la 3-4 junularkunvenon en Nigra Arbaro, en la junulgastejo Hebelhof apud la 1.500 metrojn alta Feldberg proksime al Titisee. Ebleco praktiki skiadon. Skribu al Germana Esperanto-Junularo, T 6/18, Mannheim.

ZAMENHOF-SOLENADOJ. — Fine de la jaro 1960, en diversaj urboj, estis inaŭguritaj pliaj Zamenhof-stratoj kaj parkoj.

Altnivela solena memorigo pri Zamenhof okazis ĉe la Kapitolo en Romo. Solenajo ankaŭ okazis en la Domo de Medicinistoj en Moskvo.

EN HUNGARUJO. — En Szeged estis fondita Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj biblioteko.

Dua eldono de lernolibro de Julio Baghy aperis (nur unu jaron post la unua.)

Hungarlanda Societo estas refondita.

EN RUMANUJO. — Ŝajnas ke la tiea movado reaktiviĝas. Oni anoncas represadon de granda vortaro, gramatiko kaj lernolibro.

Kunvenoj okazas en pluraj urboj.

LA VOĈO DE AMERIKO. — Sub la titolo : Usono sub ĝia nova Prezidanto Kennedy », la usona oficiala radio-servo « Voĉo de Ameriko » faros novajn dissendojn en Esperanto sur mallongaj ondoj, la 17-an, 24-an, 31-an de Marto, kaj la 7-an de Aprilo, de la 23-a ĝis la 23-30a horoj (MET) sur ondlongoj : 37.20 m. kaj 48.62 m.

GEONKLOJ ESPERANTISTAJ. — Estis starigita sistemo por kuraĝiga korespondado de plenkreskuloj al novaj junaj esperantistoj, pŏr ke tiuj lastaj konservu intereson en la lingvo. Interesataj infanoj kaj eventualaj « geonkloj » skribu al : S-ro J. H. Sullivan, 3 Berwick Avenue Urmton, Manchester, Anglujo.

BRILA EĤO DE DECIDO DE UNESKO. — Utiligante la decidon de UNESKO, ke Dro Zamenhof estu celebrata, kiel unu el la grandaj personecoj de la homaro, esperantistoj sukcesis sendigi oficiale materialon por leciono pri Zamenhof al lernejoj de Finnlando, Jugoslavio, Norvegujo, Italujo, kaj al provinco Santa Fe, Argentino.

Deziras vendi Esperanto triumfonta

(227 diversaj numeroj)
Ernst MUTHSCHALL
Halle (Saale) D.D.R.
Am Bergmannstrost 18

ĈU KULTURAJ KAJEROJ plenumis siajn promesojn ?

Ĉu vi konsentas helpi nin por plibonigo de via revuo ?

ABONU,
REABONU,
ABONIGU viajn amikojn !

Vidu la adresojn de la perantoj sur la lasta paĝo.


La francoj adresu siajn abonojn al :

S-ro MICARD, Kulturaj Kajeroj,
Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C.C.P. Nantes 2349-62

SAUMUR

Vojaĝante de Angers al Saumur, ni kontaktiĝas kun riĉa kaj bela regiono nomita « La Valo » (kun ĉef-litero !) bananta, se la vetero estas favora, en ora lumo. Valo, kie la riverego « Loire » sterniĝas, kie abunde kreskas floroj, fruktoj kaj legomoj. Precipe frumaturaĵoj estas grandskale kulturitaj : je la sezono plenplenaj vagonaroj, kamionoj, eĉ kelkaj aviadiloj, kunportas el Saumur asparagojn kaj freŝajn fazeolojn, fragojn kaj pirojn.

Sude de la Loire, la kalkaj montetoj estas tute kovritaj je vitejoj. Subgrunde, tiuj montetoj, el kiuj oni eltiris la kalkajn ŝtonojn por konstrui



Saumur

la domojn de la « Saumur » anoj, fositaj, kavigitaj, oferas subterajn galeriojn, amplekse disbranĉigitajn, kiuj iĝis vin-keloj aŭ kulturejoj por fungetoj nomitaj « fungoj el Parizo » !

Pro tia produktema grundo kaj subgrundo, lokaj industrioj prosperas : tiu de la vino, kaj tiu de la konservaĵoj de fruktoj kaj legomoj. Kelkaj ciferoj, se vi volas, pri jara produkto : verdaj fazeoloj : 1.600 tunoj ; asparagoj : 600 tunoj ; fungoj reprezentantaj 9.000 tunojn da konservaĵoj.

La vinoj estas duspecaj : la natura blanka, ruĝa aŭ rozkolora, kaj la ŝaumanta, lau maniero el « Champagne ». Vizito de keloj por ŝaumigado de vino estas interesa. Ili havas surfacon de kvin ĝis dek hektaroj, kaj estas ekipitaj per la plej modernaj teknikoj por la transformado, konservado kaj stokado de la vinoj.

Ĉar ni parolas pri ekonomiaj aferoj ni povas plue substreki, ke Saumur ankoraŭ posedas tre malnovajn fabrikojn, ofte familiajn, pri rozarioj, kaj religiaj medaloj. El Saumur elvenas preskaŭ la tuto da rozarioj venditaj en la tuta mondo. Estas ankaŭ fabrikoj de karnavalaj maskoj.

Sed, ni lasu tiajn komercajn aferojn por reveni al la turistaj.

Lasta mondmilito multe suferigis Saumur, sed rapide modernaj kvartaloj anstataŭigis la ruinojn. Feliĉe la plej historiaj monumentoj ne tro suferis. La ĉefa estas la Kastelo, kies impona silueto aperas de malproksime. Ĉi estas konstruita sur suprajo de monteto, kaj superstaras sur iama miniaturo « La riĉegaj horoj de la Duko de Berry » multoble reproduktita per afiŝoj de la turisma oficejo. Malfeliĉe, la nuna kastelo aperas malpli bela ol tiu de la afiŝo ! Tempo kaj militoj forpelis multajn el ĝiaj ŝtonbelaĵoj. Tamen, ĝi restas impona monumento konsistanta el kvadrata interna korto, ĉirkaŭita de kvar ĉef-konstruaĵoj kun dikaj turoj ĉe ĉiu ekstera angulo. En la korto estas malnova puto, kaj enirejoj de malliberejoj, kiuj detenis, dum la pasinteco, famkonatajn kaptitojn.

Du muzeoj estas instalitaj en la kastelo mem. Ĉe la unua etaĝo, oni trovas lokan arkeologian kolekton, malnovajn meblojn, kaj ĉefe, multvaloran kolekton de ceramikoj. Prezentitaj laŭ kronologia ordo, ili prezentas al la vizitantoj elmontrajon de la diverseco, kaj de la teknika perfektigado de la dekoraciaj artoj, tra la mondo, de post la Mez-epoko ĝis la dek oka jarcento.

Ĉe la dua etaĝo, estas kurioza kaj tre loka muzeo de la « Ĉevalo tra jarcentoj ». La lernejo

EL IE EN LA MONDO

KELKAJ NOTOJ PRI MONDVOJAĈO

Estas malfacile rifuzi intervjuon al la simpatia redaktoro de « Kulturaj Kajeroj », kiu deziras ke mi rakontu ion al vi pri mia vojaĝo ĉirkaŭ la tero.

Sed kion diri al legantoj de kultura revuo ? Kiam mi relegas mian sekan raporton, mi ĉefe vidas teknikajn aferojn pri mia laboro. — Tamen mi provos eltiri kelkajn rapidajn impresojn kiuj eble interesos vin.

NOVJORKO. — La urbo tre fieras pro la grava publika librejo. Efektive estas bela konstruaĵo en la centro, enhavanta multegajn volumojn pri ĉiuspecaj temoj kaj ĝi estas tre multe vizitata.

Filadelfio. — En muzeo mi povis konstati la decidigan influon de la ĉarpentistoj en la organizo de la revolucio kontraŭ la Angloj.

En la urba teatro, mi vidis « Carmen », la operon de Bizet, en franca lingvo. Kompreneble, kompare al la pariza spektaklo, estis iom malriĉa, sed por mi la franca akcento estis teruta. La aktoroj **ludis sen iu hispana pasio kaj detalo amuzis min** : je certa momento Carmen lasas ĉe la centro de la scenejo siajn botojn sufiĉe longe kaj imagu ke, anstataŭ esti el ledo, oni konstatis ke ili estas el brila nigra moderna kaŭĉuko !



La Novjarka haveno

pri rajdarto fondita de Henriko la Kvara, ĉe la fino de la 16a jarcento, ankoraŭ funkciis ĝis la mezo de la 18a. Sed la Unua Imperiestro starigis la nunan famkonatan maneĝon, kun ĝia jara tradicia karuselo. Kiel oni povas diveni, jarojn post jaroj, la ĉevaloj malaperas, kaj nun, flanke de la kavaleria lernejo estas milita lernejo pri motoroj.

Krom la kastelo estas aliaj belaĵoj en Saumur. Laŭlonge de la Loire belaj kajoj staras la teatro, la urbodomo konstruita de la komenco de la 16a jarcento. Inter la du pontoj, do en insuleto meze de du brakoj de la Loire, estas la domo de la Reĝino de Sicilio, eleganta konstruaĵo de la 15a j. c., riparita de nelonge pro malbonfaro de la milito.

Promenante tra la urbo, oni povas viziti interesajn preĝejojn, ĉarman urban ĝardenon, kaj vidi en malnovaj stratoj, pitoreskajn domojn, kiuj estis elektitaj de « Balzac », kiel kadroj por siaj romanoj « Eugénie Grandet », kaj « La Comédie Humaine ».

En ĝia diverseco, Saumur estas koketa, gaja civito, kiu meritas plene la nomon al ĝi donita

« La Perlo de Anjou »

S-ino CHEVERY.

Vaŝingtono. — Dum finsemajno mi vizitis tiun belan ĉefurbon desegnitan de la Franco Pierre Lenfant.

Se per lifto oni iras ĝis la supro de la Obelisko, sama stilo kiel tiu de la Concorde-placo en Parizo sed 110 metrojn alta, oni vidas, oriente, je ekstremo de longa kaj larĝa aleo, la parlamentejon « Capitol », norde, la « Blankan Domon » de la Prezidanto de Usono, kaj okcidente la Militistan Ministrejon, laŭgan, kvinpintan konstruaĵon, kiu entenas 3.000 laborantajn personojn. En ĝi troviĝas magazenoj, kino, kaj ĉambrego uzata por diversaj religiaj servoj.

Dank'al S-ro Solzbacher mi povis viziti la Propagandan Ministrejon kie funkcias la « Voĉo de Ameriko », kiu elsendas en 32 lingvoj, inter kiuj nun ankaŭ Esperanto.

La nova katolika katedralo, tute blanka, aspektas kiel « Sacré-Cœur » en Montmartre, sed estas

io speciala : la katedralo entenas kafejon, restoracion, vendejon kaj vartejon por la infanoj de la vizitantoj !

Longe mi restis en la scienca muzeo kie troviĝas multaj objektoj koncerne la amerika historio, inter kiuj la aviadilo de Lindbergh. La arta muzeo meritas laŭdojn. En ĝi oni trovas, krom artverkojn, prospektojn pri pentrajoj, kaj ĉe la enirejo oni povas lui malgrandan posradioparaton kiu permesas aŭskulti priskribojn pri la ĉefaj pentrajoj kaj iliaj aŭtoroj. La diverskoloraj infanoj invadas prefere la zoologian muzeon, kie oni vidas en normala dimensio la vivon de la malnovaj Indianoj kaj Eskimoj kaj ankaŭ multenombrajn naturigitajn bestojn, inter kiuj gorilo de 220 kilogramoj kaj baleno de 63 tunoj.

Ĉikago. — Sub la gvido de kelkaj samideanoj mi tre ĝuis la grandegan muzeon pri sciencoj, kie troviĝas interalie germana submara ŝipo kaptita dum la unua mondmilito. Oni diras ke oni bezonas unu monaton por vidi ĉion. — En la planetario oni montras fotojn de la dua flanko de la luno — de rusa deveno.

St-Louis. — Sur la rivero Mississipi oni povas vidi ankoraŭ nuntempe spektaklon, kiu okazas en tre malnova ligna ŝipo (Showboat). La artistoj ludas en malmodernaj vestaĵoj komedion sufiĉe ridindan sur la scenejo, sed la vera spektaklo estas en la ĉambrego, kie la ĉeestantoj konstante interrompas la artistojn, kritikas, krias, ridas kaj eĉ ridegas.

San Fancisco. — La plej ĉarma parto de tiu urbo por mi estis la botanika parko kun kreskaĵoj el la tuta mondo, kaj ĉefe la japana ĝardeno. Estis la tempo de la florado de la ĉerizarboj. Apud la tetrinkejo estis vera atmosfero por S-ino Butterfly. Ankaŭ paradizo por la bestoj : la birdoj kaj sciuroj maltimeme venas apud vin. En la akvario oni povas vidi, inter multaj fiŝoj, unu-metran testudon elegante naĝantan antaŭ viaj okuloj.

Hawai. — Ne kredu la rakontojn pri paradiza vivo sur tiu insulo. Cio estas kiel en Usono. Eĉ mi ne rimarkis miksojn inter blankuloj kaj anoj de la bruna raso. Tamen, kelkaj spektakloj ravis min. Ekzemple, belaj junaj viroj kiuj ondskiis sur la maro, starante sur unu tabulo 4 metrojn longa kaj 30 centimetrojn larĝa. Ili similis al starantaj rajdantoj sur la dorso de sovaĝaj ĉevaloj. — Ankaŭ mi vidis indiĝenojn danci kun longaj folioj, floroj, bastonoj kaj glavoj, eĉ specialistoj uzas brulantajn torĉojn, kiuj timigas la rigardantojn. — Interese estis vidi konkurson por la plej rapide faŭita fajro. La konkurantoj frotas du specojn de ligno unu kontraŭ la alia kaj ili sukcesas flamigi kokoŝelon post 5 minuta rapida frotado.

Franca Influo. — Nia influo en Usono ŝajnas esti tre malgranda. Evidente oni scias en la orienta parto, ke Francujo helpis al la liberigo de la landoeble ĉar ni sendis la altan statuon de la Libereco, kiu staras ĉe la enirejo de Novjorko.

En la magazenoj kaj restoracioj oni povas rimarki kelkajn francajn vortojn. Ni trinkis en kafejo « Moulin Rouge », kie la servistinoj estis vestitaj kiel la virinoj de 1900, kaj manĝis en restoracioj « Pigalle », « Maisonnette », « Normandie ». Mi dormis sub « Arc de Triomphe » kaj sub « Pont Neuf » — tio estis pentrajoj de Parizo alkroĉitaj super mia lito en hotelĉambroj.

Pri edukado mi ne povis multe kompari, sed mi konstatis, ke la infanoj estas en lernejo nur de la 8a ĝis la 14a horo, ke ili havas malmultan laboron hejme kaj ŝajne estas 1 aŭ 2 jarojn pli malfruaj ol niaj infanoj en la programoj. Aliflanke ili multe sportludas, kaj longe rigardas televidon. Pro televido la infanoj perdas multan tempon kaj enkapigas tro multe da stultaj reklamoj.

Aŭstralio. — Tiu juna lando ne havas pretendon pri kulturo, oni ĉefe pensas pri organizo de konforta vivo por kreskanta popolo. La muzeoj estas modestaj. Tamen la arta muzeo de Sydney estas sufiĉe interesa — kaj ĉe la pordo de la scienca muzeo de Melbourne, estas alta rajda statuo de Jeanne d'Arc. En tiu urbo estas eleganta konstruajo duonfermita, ĉe la parko, kiu servas kiel koncertejo, kaj la larĝaj sportejoj de la Olimpiaj Ludoj.

En teatro mi tre ĝuis novan amerikan opereton : « My fair Lady ». Ĝi estas muzika komedio. La temo estas la teatrajo de Bernard Shaw : « Pygmalion ». Oni povas esperi, ke ni baldaŭ havos tradukon en Francujo kaj iam oni povas aŭdi ariojn ĉe Radio.

Djakarta. — La vivkondiĉoj en Indonezio havas malaltan nivelon, kaj pro manko de lernejoj oni dividas la lernantojn en 2 klasoj. La duono iras matene en la lernejon, la aliaj venas posttagmeze.



Calcutta. — En tre varma atmosfero mi vizitis la altan muzeon de la urbo. Ĝi estas entute brita, bela donaco de Anglujo. Ĝi entenas multajn pentrajojn de la anglaj estroj, ĉefe militistoj. Mi rimarkis sufiĉe multajn Hindajn vizitantojn. Estus interese koni iliajn pensojn.

Eble ankaŭ la viajn post tiu ĉi legado.

J. GUILLAUME.

Ĉefdelegito de U.E.A. en Francujo.

ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo « Grésillon »
BAUGÉ *(M.-et-L.)*
– FRANCUJO –
Tél. 34

Periodoj Planitaj dum la Somero - 1961 -

UNUA PERIODO : de la 20-a de Junio ĝis la 10-a de Julio

Esperanto-Kurso por komencantoj

Samtempe : Turismaj karavanoj
Ripozrestadoj, promenadoj
Fiŝkaptado, ludoj, distraj vesperoj.

DUA PERIODO : de la 10-a de Julio ĝis la 24-a de Julio

Kulturaj internaciaj ferioj

La titolo de tiu periodo taŭge resumas ĝian programon :

Ferioj en la ripoziga kadro de la kastelo kaj de ĝia parko.
Kulturo dank'al la valoraj prelegoj faritaj de elstaraj esperantistoj.
Internacia etoso ĉar oni kalkulis 12 diversajn landojn samtempe reprezentitajn.

Prelegos :

Sino Emilja LAPENNA, komitatanino de U.E.A.
Fino LLECH-WALTER, diplomita de Beletra Superaj Studoj.
Sro LLECH-WALTER, Prezidanto de la Franca Unuiĝo, komitatano de U.E.A.
Dro ALBAULT, komitatano de U.E.A.
Sino CHEVERY, Prezidantino de la Esp.-grupo de Angers.

Kelkaj titoloj de prelegoj : Dramo en la esperanta literaturo -- Popular-sciencaj temoj en la esperanta literaturo -- La Kataluna folkloro -- La ekzistencialistaj herooj en la literatura verkaro de J.-P. Sartre -- Malsato en la Mondo -- Spirito-scienco laŭ Martinus -- Angers, historia kaj arta urbo.

PROGRAMO

Lundo 10-an : alveno de la partoprenantoj — je la 21-a : interkona vespero.
De Mardo 11-a ĝis Dimanĉo 23-a : Ĉiumatene : Prelegoj ;
Posttagmeze : Promenadoj ;
Vespere : Prezentado de lumbildoj, esperant-lingvaj, filmoj, ludoj.
Lundo 24-an : Foriro de la partoprenantoj.

Diversaj tuttagaj aŭ duontagaj ekskursoj estos organizita.

La Esperantista Kulturdomo speciale invitas la Esperantistojn al partopreno en tiu periodo, kiu, la antaŭajn jarojn, famigis ĝin en la tuta mondo.

TRIA PERIODO : de la 24-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto

SPECIALA SUPERA KURSO DE ESPERANTO

POR LA ESTONTAJ ESP-INSTRUANTOJ

Kurso por komencantoj ;
Kurso de Franca lingvo por la alilandanoj pere de Esperanto (laŭ la nombro de la enskribiĝintoj).
Ekskursoj.

KVARA PERIODO : de la 8-a ĝis la 29-a de Aŭgusto (alveno la 8-an de Aŭgusto)

NIAJ KULTURAJ ESPERANTITAJ SEMAJNOJ

PROGRAMO

Mardon 8-an : Alveno de la partoprenantoj.

De Merkredo 9-a ĝis lundo 28-a : Matene : Esperanto-Kursoj :
— **por komencantoj** (Sro Jelenc).
— **por praktikantoj** (S-ro Thébaud).
— **supera kurso** (Sro Babin).

Posttagmeze : Plektarto - Blindarto.
Je la 18-a : Konversacio sub la gvidado de la profesoroj.

Vespere : Distrajoj, prezentado de filmoj, lumbildoj, ludoj, dancoj, ktp...
Dimanĉoj 13-a kaj 20-a estos liberaj. Estos eble organizi ekskursojn.
La banejo estos malfermita de la 16-a ĝis la 18-a.

KVINA PERIODO : de la 30-a de Aŭgusto ĝis la 12-a de Septembro (alveno la 30-an de Aŭgusto)

STUD-PERIODO ORGANIZITA DE U.E.F.

Praktika kaj Supera Kursoj sub gvidado de Sro Ribot. (Detala progromo sur aparta folio).
Estos eble ankaŭ ripozi

Por ricevi detalajn informojn sendu internacian respond-kuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Kastelo « Grésillon », BAUGÉ (M.-et-L.), Francujo


KIBUCO, kooperativa vilaĝo en Israelo

(II)

Rikolto de ĉiuj kibucoj estas transdonata al la kooperativa societo Tnuva, kiu prizorgas ankaŭ ĝian prilaboron — precipe tiun de lakto — kaj distribuon tra la lando. Troaĵon ĝi eksportas. Ĉiujn bezonaĵojn liveras al la kibucoj Hamaŝbir, alia granda kooperativa societo. Ĝi fabrikas iliu parte en siaj propraj entreprenoj.

Unuavice dediĉas sin la kibucoj al agrikulturo kaj al ĉiuj parencaj fakoj. Grenprodukto estas ilia plej grava tasko, ankaŭ kreskigo de ĉiuspecaj fruktoj kaj legomoj, krom tiu de industriaj plantoj, inter kiuj estas la ĉefaj kotono, sukerbeto kaj arakidoj. Grandan signifon havas la moderna, en sia amplekso ĉiam kreskanta kokobredado kun rezultanta livero de viando kaj ovoj, ankaŭ bredo de hejmaj bestoj, unuavice de laktoriĉaj bovinoj kaj ŝafoj. Estas kibucoj, kiuj bredas ankaŭ fiŝojn, inter ili iuj dediĉas sin ekskluzive al fiŝkaplo.

Kie la cirkonstancoj tion permesis kaj propra aŭ ĝenerala neceso postulis, eslis fonditaj en la kibucoj ankaŭ industriaj entreprenoj, regule malgran-



daj aŭ meze grandaj, sed iam ankaŭ de respektinda vasto.

Inter la lastaj estas citindaj grandaj fabrikoj por prilaboro de ligno, ankaŭ brikfabriko kaj fabriko de ceramikaĵoj, de farboj, de ŝuoj k. . Estas kibucoj, kiuj konstruas boatojn, aliaj sin okupas pri prilaboro kaj konservado de fruktoj kaj legomoj. En iuj lokoj, kie regas taŭgaj kondiĉoj arangis kibucoj apud sia agrikultura mastrumo ankaŭ sanatoriojn.

Ĉiun kibucon regas Ĝenerala Membra Kunveno. Ĝi akceptas novajn membrojn kaj elektas administran Komitaton kun eventuale necesaj specialaj Komitatoj, ĉiujn kun unujara funkciado ? Ĉiu komitatano plenumas krome sian normalan laboron en la kibuco. Se tion postulas intereso de propra kibuco, de kibuca movado ĝenerale aŭ de la lando, la membroj foriras labori ekster sian kibucon. Kibucanoj funkcias kiel ministroj, parlamentanoj, ambasadoroj, oficiroj, ktp.

Geedzoj havas sian apartan ĉambron, needziĝintoj loĝas 2-3 komune. Se la ekonomiaj cirkonstanoj de la kibuco tion permesas, estas la loĝejoj pli grandaj, plurĉambraj kaj pli komfortaj.

La infanoj vivas dum plejparto de la tago en specialaj domoj de infanoj, kie ili ĝuas ĉiun eblan prizorgon de plej alta standardo kaj laŭ lastatempaj metodoj. Ce fino de la labortago prenas ilin al si la gepatroj, tiam komplete liberaj kaj povantaj dediĉi tiujn horojn eksklusive al la infanoj. Tiuj foriras poste dormi en domon de la infanoj, inter siaj amikoj. Infanoj vizitas dekdujaran lernejon kaj daŭrigas la studon ekster la kibucoj en specialaj kaj altaj lernejoj, se ili montras kapablon. Pluraj kibucoj havas siajn propraju unuarangajn fakajn lernejojn, precipe agrikulturajn.

Manĝo estas prezentata en komuna manĝejo, kiu regule estas ankaŭ ejo de kunveno. Multaj kibucoj posedas librejon kaj legejon, koncerthalon, iam ankaŭ malgrandan lokan muzeon.

Ĉiu membro ricevas la necesan vestajon kaj tolajon — neniel unuforman — kaj prizorgata estas ankaŭ ilia riparo kaj lavado. En sia loĝejo li havas meblaron, radion kaj ĝenerale luksON pli aŭ malpli grandan laŭ financa situacio de la kibuco. Dependas de tiu ĉi stato, ĉu kaj ĝis kiu mezuro povas esti plenumitaj specialaj deziroj de la membroj. Ili ofte posedas privatan bibliotekon, kolektas poŝtmarkojn aŭ pasigas sian liberan tempon per aliaj plačokupoj laŭ sia prefero.

Cetere prizorgas la kibuĉo ĉiujn bezonojn de siaj anoj kaj tial ne aperas neceso de moncirkulo interne en la kibuco. Tamen krom regula pošmono ricevas ĉiu membro en speciala okazo - libertempo p.s. - konvenan monsumon.

Sen kibucoj ne estus en hodiaŭa Israelo loĝantaro de hebreaj terkulturistoj kaj sen kibucoj oni apenaŭ povus plenumi la grandajn taskojn, kiuj tian landon ankoraŭ atendas. Ĝi volas fariĝi floranta ĝardeno kiel diras la Biblio - Jesaja 35, 1 - « Ekĝojos la dezerto kaj la senakvejo, triumfos la stepo kaj ekfloros kiel lilio ».

La evoluo pruvas, ke la vojo, elektita de la kibucoj, estis ĝusta.

Ota Ginz, Kirjat Jam.

Traduko en nacian lingvon kaj publikigo estos bonvenata. S-o O. Ginz, Shikun Agash 30-8, Kirjat Jam Bet, Israelo, estos danka por alsendo de 2-3 ekz. de la publikaĵo.

KIEL VIVIS

LA INDIANOJ ?

Tra la filmoj kaj la libroj oni kutime vidas la Indianojn kun plumoj sur kapo, kaj pafilo en mano, rajdantajn rapidegajn ĉevalojn. Ili estas persekutatoj, ĉu persekutantoj. La infanoj kaj eĉ la plenkreskuloj konsideras ilin kiel bonkorulojn, sovaĝulojn aŭ artistojn. Ili ne konscias, ke la « ĉiutaga » Indiano estis ankaŭ, estis ĉefe, homo.

En sia familio, tribo aŭ federacio, la Indianoj vivis feliĉan sed malfacilan vivon. Ĉiuj, viroj, virinoj kaj infanoj partoprenis en la komuna vivo.

La bestoj estis pli taŭge adaptitaj al la lando sovaga ol la homoj. Ili havis siajn akrajn ungegojn, kornojn kaj dentegojn por sin defendi kontraŭ la malamikoj, kaj siajn felojn kontraŭ la malvarmego. Ĉiujn defendilojn la vivoj devis preni de la bestoj helpe de primitivaj armiloj. Pro tio ili estis devigataj pligrandigi siajn korpajn fortojn kaj pliakrigi siajn vidpovon kaj aŭdpovon per konstanta ekzercado. Cirkaŭ ili etendiĝis la lernejo kaj ili estis mem siaj instruantoj. Ili observis la sinsekvon de la sezonoj kaj studis la morojn de ĉiuj bestoj. Ĉiu rompita branĉo, ĉiu signo sur la rokoj aŭ sur la tero estis plensignifa por ili, kiuj bone konis la mondo cirkaŭan. Ili estis lertaj ĉasistoj sed ankaŭ la bestoj estis lertaj ; ili do devis esti trovemaj pri fabrikado de fiŝhokoj, retoj kaj kaptiloj. La zorgoj kaj la laboro ne mankis al ili kaj, dume, la virinoj laboris en la domo kaj sur la kampoj : ili plantis, semis, rikoltis, kuiris, tanis kaj kudris. La infanoj tre frue ekzercadis : la knaboj lernis de siaj patroj la ĉasarton kaj la knabinoj laboris kun siaj patrinoj.

Kiam venis la blankuloj komenciĝis la malfortiĝo de la Indiana civilizo, pro tio ke ilia vivo tute šanĝiĝis. La detruado de la ĉasajoj malaperigis la ĉasistojn. La modernaj iloj kaj mašinfabrikitaj ajoj preskaŭ nuligis la manfaradon. Sed la kontribuo de la indiana civilizo ankoraŭ aperas ĉie.

Kiuj estis la ĉiutagaj zorgoj de la Indianoj ? Laŭ la geografia situo kaj konsekvence la klimato kaj la vegetajaro, tiuj zorgoj estis diversaj. Ni « vizitu » la arbar-Indianojn.

Ili vivis en la densaj arbaroj, kiuj etendiĝis en la Nord-Orienta parto, inter la Atlantika marbordo kaj la Grandaj Lagoj. De la arbaro la Indianoj ricevis aŭ prenis ĉion : nutrajon, vestojn kaj domon. Ili šatis ĝin kaj ornamis siajn vestojn kaj potojn per desegnojn de folioj kaj floroj.

Ĉio el la arbaro estis uzebla : la folioj kaj la medolo por bruligi fajron ; la junaj arboj por fari fostojn kaj konstrui la domojn, kiujn oni kovris per arboŝelo. El šelo kaj ligno la Indianoj faris la pladojn, kuirilojn kaj konservujojn. El ligno ili faris diversajn ilojn ; el arbo — kaj planto-fibroj ili faris teksajojn kaj ligilojn.

Estis do necese mortigi la arbojn, kaj tion la Indiano bedaŭris. La Granda Dio iam diris, ke la bestoj kaj plantoj estas la « hom-servistoj ». Sed la Indiano mortigis bestojn nur kiam li bezonis nutrajon kaj prenis de la arbaro nur tion, kio al li estis necesa.

Granda parto el la nuntempa amerika nutrajaro venas de la Indianoj, ĉefe la maizo, kiu ebligis la unuajn blankulojn ne morti pro malsato. La kultur-metodo estis tute simpla. La Indianoj plugis la teron per iloj el malmola ligno aŭ per best-skapoloj. Kiam la unuaj folioj de la kverkoj estis tiel larĝaj, kiel sciuro-piedoj ili semis aŭ plantis. En teramasetojn sesdek centimetrojn malproksimajn unu de la alia, ili metis maizgrajnonj. Sur la suda flanko de tiuj amasetoj ili plantis kukurbojn, kiuj rampis ĉirkaŭ la maizplantoj. Ankaŭ fazeoloj estis semitaj, kiuj alkroĉiĝis al la maiztrunketoj. Inter la amasetoj oni semis sunflorojn. Legendo diris, ke la maizo, la fazeolo kaj la kukurbo estis gefratoj, kiuj ĉiam vivis kune.

Ankaŭ sovaĝaj arboj kaj plantoj donis al la Indianoj nutrajojn : radikojn kaj grajnojn, foliojn kaj burĝonojn, fruktojn kaj la dolĉan sukon de la aceroj.

En tiu Nord-Orienta parto de Ameriko la arbaro grandparte malaperis. Kie vivis multaj triboj, tie nun staras la altaj domegoj de Detroit kaj Ĉikago. La posteuloj de tiuj Indianoj, kiuj akceptis la blankulojn trapasintajn la oceanon nun laboras en grandaj farmoj aŭ en fabrikoj. Sed, ĉiun lastan Novembran jaŭdon, ili ankoraŭ celebras, kune kun la posteuloj de la blankaj envenintoj, la manĝon de la « Thanksgiving Day », kiu konsistas el tiuj manĝajoj, kiuj iliaj prapatroj kulturis kaj kiuj ebligis la prapatroj de la nunaj amerikanoj travivi ĉe la komenco.

P. B.



LA LINGVA ANGULO

Israelo - Izraelo

NE samkaza estas la prefero por **s** aŭ **z** ĉe la vorto **Israelo-Izraelo** aŭ ĉe **Jesuo-Jezuo.** En ĉi tiu la fonemo **z** okazas ekz. en kataluna lingvo dum en kastila la prononco estas **s.** Sed ĉe la nomo de la juda ŝtato la litero **s** troviĝas ĝuste antaŭ la voĉa konsonanto **r,** kaj ĝia voĉeco asimilas, kaŭzas la voĉigon de la **s,** prononcigas ĝin **z.** La kastila lingvo teorie ne havas la voĉan sonon de **z,** sed nur la senvoĉan de **s** ; tamen, estas al la kastillingvanoj neeviteble voĉigi la **s** de vortoj en kiuj tiu litero troviĝas antaŭ voĉa konsonanto **d, g, r,** k. a. : **desde, rasgo, Israel,** k.c. Tia asimila fenomeno estas fonetike natura. Se ĝi okazas eĉ en la nuntempa kastila, kies naciaj parolantoj kredas ke ili ne povas — aŭ tre malfacile — prononci **z,** multe pli certa ĝi estas en la aliaj lingvoj ne nur romidaj, sed ankaŭ slavaj k. c. De logike estas cedi al Izraelo, ĉu ?

Delfi DALMAU,

Membro de la Akademio de Esperanto.

Al Nova Jaro

Falas de la kalendaro
Folietoj for kaj for,
Kaj por la malnova jaro
Baldaŭ batos lasta hor'.

Venos en mateno frua
Atendata Nova Jar'.
Mil naŭcent sesdek unua
Kun esperój por homar'.

Ni esperas ke konstante
Homoj luktos por la Ver'
Kaj la lingvo Esperanto
Disvastiĝos sur la ter' ;

Pliboniĝos homaj sortoj
De polusoj ĝis tropik'
Estos plej ŝatataj vortoj :
Kamarado kaj Amik' ;

Malaperos vort' : Milito.
Paco estas nia cel',
Estos ni unuigitaj
Sub feliĉa Verda Stel' ;

Malaperos sen reveno
La klopodoj pri azil'
Kontraŭ bombo hidrogena,
Kontraŭ ĉia-ajn armil'.

Do alvenu sen prokrasto,
Atendata Nova Jar',
Estu vi la kara gasto
Por la Esperantistar' !

Verkis : Aleksej TOLOKONCEV.
Kostroma (Sovetunio)
(Decembro 1960).

La redakcio de Kulturaj Kajeroj dankas la multajn amikojn, kiuj sendis siajn bondezirojn okaze de la nova jaro, kaj deziras al ĉiuj legantoj sanon, feliĉon kaj pacon.

Tra la Esperanta literaturo

NYLEN Paul Axel

Tiu preskaŭ nekonata « pioniro » estas prezentita en la Enciklopedio jene :

Svedo, redaktoro ĉe « Stockholms-Tidningen ». Naskiĝis la 20a de Junio 1870 en Tillinge apud Enköping. Estis ĉefredaktoro de sveda polica gazeto, 1906-20 ; tradukis al la sveda diversajn librojn. Esperantisto de aŭgusto 1892, ano de klubo Esperantista en Uppsala de 1893. Kunlaboris al « Lingvo Internacia » de ĝia komenco en decembro 1895 kaj estis ĝia redaktoro de 1897 ĝis 1901. Eldonis laŭ komisio de Zamenhof liajn proprajn broŝurojn portugalan kaj holandan en 1896.

Multe korespondis kun Zamenhof, Gernet, Trompeter, Ostanjevič, Lengyel, Meray, k.t.p. Gvidis kursojn.

Partoprenis 8 Universalajn Kongresojn, inter ili la unuan kaj la duan.

Verkoj :
Sveda lernolibro (1896) - Esperanta vortaro (1897).
« Fraŭlino Julie », tradukita el Strindberg (1908).
« Per balono al la poluso », traduko kunlabore kun Engholm.
Estis redaktoro de « La Espero » (1918-20, kaj 1917) Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

—o—o—o—o—

El la tradukaĵoj de Paul Nylen ni prezentas al vi :

LA OKULVITROJ DE L'PRINCO

(verkita en angla lingvo de S-ino Laura Ridding)

Estis la naskotago de l'princo Alethiades : li atingis la plenaĝon. La reĝo vokis lin al si en la jaspisan salonon de l'palaco, kie antaŭ sia kolektiĝinta korteganaro li diris la sekvantan mallongan sed solenan paroladon al la juna princo.

« Mia filo, antaŭ ol la festo jam komenciĝas, mi havas la komision transdoni al vi objekton de plej granda graveco. Via baptopatrino, la feino laŭ kies nomo vi estas nomita, en mian konservon konfidis multekostan donacon, kiu fariĝas hodiaŭ via posedaĵo ».

Kun tiuj vortoj li metis kesteton en la manon de l'princo. Alethiades malfermis ĝin kaj elprenis el ĝi magian okulvitron, kiun li surmetis.

Kiam li rigardis tra ĝi, lia vizaĝo ricevis tute alian esprimon. En agonia malespero li turnis sin de l'patro al la korteganoj, la korpgardistaro, la servantoj. Post tio li disetendis la brakojn kun furioza ekkrio, kuregis malsupren laŭ la marmora ŝtuparo en la ĝardenojn, rapidegis tra la irejoj kaj la floraleoj, eksteren en la vastan parkon — for, for tiom longspace kiom fulmerapidaj piedoj povis lin porti, ĝis lin haltigis granda lageto, kiu kuŝas kiel neevitebla baro en lia vojo. Serio da altaj kanoj ĉirkaŭbaris tiun akvon, kaj ili kapobalancis al li dirante : « Ho, vi, kies okuloj estas malfermitaj, vidu kaj rigardu la devenon de ĉio ! »

Kaj li enrigardis en la profundajon kaj vidis senformajn, nigrajn, monstrojn, kiuj sin movas tie sube, kaj vidis flugilajn estaĵojn en la plej brilantaj koloroj svingiĝi super la akvo.

